

ELNA NEWSLETTER

NEWS OF THE LANGUAGE PROBLEM AND ESPERANTO AS A SOLUTION

Published by the Esperanto League for North America. September-October 1974.
Editor: Charles R. L. Power. Editorial Committee: Robert Bailey, Margaret Hagler, Dorothy Holland, Jonathan Pool. Includes section in Esperanto, Bulteno, sent to ELNA members only.

EMERGENCY—World Language Needed!

Every so often, Esperantists need to remind themselves and the general public about the urgency of our need for a world language. Because a few people persist in believing that there either is no language problem, or that it will solve itself soon enough through everyone's learning English, some of the more recent developments in the field merit the reader's attention.

1) English is no longer an official language in Quebec. The provincial parliament recently passed a bill setting out the means of fostering French in all areas of public life, including the school system. Throughout Quebec a five-year-old child can now be committed to education through the French language if he or she cannot pass a test demonstrating sufficient ability in English, regardless of which language may be the family tongue.

2) English continues its downhill slide in former British colonies. Kenya has just replaced English with Swahili as official state language, thus opening elective posts to many more citizens of that country than before, when a knowledge of English was legally required.

3) Concurrently with the decline of English in India comes increasing study of Russian. This once more demonstrates that an enduring world language cannot be founded on anything so mercurial as international power politics.

4) In the meanwhile, Britain finds the shoe on the other foot. A recent amnesty program for illegal immigrants from India was foiled by the fact that many of them do not understand English. It was necessary to hand out leaflets in ten Indian dialects to publicize the program.

5) This summer, a UN-sponsored conference on the Law of the Sea in Caracas, Venezuela, required 89 translators, 38 revisers and another 89 typists and calligraphers, plus a few executives to coordinate all this. It has not been reported what this cost the world's taxpayers on a day-to-day basis.



No language problems for J. Mizuno, a visitor from Japan, here seen with fellow Esperantists in Arizona. Seated with him is ELNA member Dr. Irene Hajdik, who learned the international language in her native Hungary.

6) According to Quinto Lingo, January-March 1974, young American tourists have found the language barrier to be the most disappointing aspect of European travel. College courses in foreign languages prove quite inadequate in actual practice. "How can we really get to know people from another country when we can't talk with them?" asked an Ohio University student.

7) In many parts of the United States, Spanish has become a virtual, if not official, state language. Crash courses for teachers previously inexperienced in Spanish or foreign language teaching may have disastrous consequences on the resulting quality of education.

8) The language of the Philippines, Tagalog, is taking on a new importance in various government offices along the West Coast. Several other minority groups, some with Oriental languages for which relatively few competent instructors exist in this country, are demanding consideration on the basis of the Supreme Court's Lau-Nichols decision, which established that a child must be taught in a language he or she can understand.

9) Despite all the above, it should be admitted that language need not present insuperable difficulties in all activities. A Tel Aviv theatrical agency recently advertised in an English-language newspaper: "WANTED URGENTLY: young, shapely, goodlooking girls to appear NUDE in a new theatrical production. No previous experience required. Language is no barrier." Unfortunately, not all of us fill the non-linguistic requirements....



A few members of the Esperanto Society of Chicago, which now includes the Medical Translation Committee.

Medical Translations Appear

One of our most active groups is the Esperanto Society of Chicago, which has been working on an important translation project for over a year. The July 1974 issue of Medicina Internacia Revuo carries the first concrete fruits of the project: two articles translated into Esperanto from the Journal of the American Medical Association.

The two articles are "Nutrition in Pregnancy—A Critique", by Howard N. Jacobson, M. D., of Boston, translated by Scott Turton, and "Photoinactivation of Herpesvirus" by the Medical News Staff of JAMA, translated by Paul C. Fox, chairman of the project. Fox is author of the recently published cassette course How to Understand and Speak Esperanto.

R. Kent Jones, who acts as project coordinator, informs us that the translation is intended to become two-directional. Translations are being made from the Esperanto Medicina Internacia Revuo into English to appear in JAMA. This action is particularly praiseworthy, since it will result in informing the sizeable membership of the AMA that worthwhile medical literature exists in the international language. It would be well if others would follow Chicago's lead by providing translations from other areas of Esperanto literature.

SFSU Workshop 1975

We are very happy to announce that San Francisco State University plans to invite William Auld of Scotland to direct its summer Esperanto Workshop for the sixth consecutive year. The Workshop offers the most prestigious series of courses now available in this country.

This year's planned innovations are a stronger cross-cultural orientation, to be effectuated by an assistant from abroad, and, as the result of requests from several former Workshop participants, a separate course for young children. We ask all who are interested in the children's course to contact the Central Office of ELNA (P. O. Box 508, Burlingame, CA 94010), so that we can demonstrate public interest to SFSU. This is an ideal plan for families with youngsters, and we hope that the course can be incorporated into the Workshop on a regular basis.

The cross-cultural orientation will be Oriental in 1975, according to present plans. A well-known Japanese instructor of Esperanto has been contacted with a proposal to assist Professor Auld. If all goes smoothly, this will be an invaluable opportunity to become acquainted with the culture of a country which already has one of the strongest Esperanto movements in the world today, and which promises to become more important in our planet-wide community as time goes on.

Further information will appear here soon!

ELNA President Speaks

ELNA President E. James Lieberman, M. D., asks members to sustain our present momentum and ease the current financial burdens by:

- 1) renewing early for next year;
- 2) recruiting members to strengthen the base of ELNA;
- 3) making a contribution—a few dollars each month, or each time you receive a Newsletter, as a vote of confidence;
- 4) enlisting the aid of friends and philanthropists who, on seeing evidence of progress, would contribute;
- 5) patronizing ELNA's book service.

ANNOUNCEMENT

Dr. Margaret Hagler asks that the Californian who wrote last year requesting a copy of her dissertation write her again at Lincolnland Community College, Shepherd Road, Springfield, IL 62703.

Vermonta ELNA-Kongreso proponita

La prestiĝa organizo Experiment in International Living invitas la Ligon kongresi tie en 1975. Kvankam la propono estas ankoraŭ pritraktota de la ELNA-Estrararo, ni anticipe donas ĉi-sube ĝiajn detalojn:

La datoj estus de vendredo, la 15a, ĝis dimanĉo, la 17a de aŭgusto. Kosto de loĝado kaj manĝoj estus po \$13 tage, se oni dividus duoblan ĉambron, aŭ po \$16 kun aparta ĉambro.

Experiment in International Living proponas kvartagan Esperanto-kurson tuj post la Kongreso. Plena kosto de la kurso, kiu daŭrus de dimanĉo ĝis merkredo, estus \$70, inkluzive loĝadon kaj manĝojn. Laŭnecese stariĝus diversaj niveloj, en grupoj de proksimume dek. La kurso daŭrus kvin-ses horojn tage, kaj oni disponus la lingvan laboratorion 24-hore tage.

Experiment in International Living troviĝas en Brattleboro, Vermonto. D-ro Alvino Fantini, kunaŭtoro de Home Study Course in Basic Esperanto, estas direktoro de ĝia fako School for International Training.

Agu nun por SIA 1975!

Kun ĉi tiu numero la legantoj trovos raportfolion kun sugestoj por la venonta Semajno de Internacia Amikeco (1975.02.16-22).

Jam estas tempo plani vian agadon por ĉi tiu tradicia festotempo esperantista. En Usono, unu el la plej kutimaj manieroj por celebrado de SIA estas proklamigi ĝin ĉe urbestroj kaj ŝtatestroj. La Centra Oficejo pretas sendi al tiuj, kiuj pretas labori tiucele, specimenan tekston por proklamo. Ni kompreneble konsilas laŭeble adapti la tekston al lokaj cirkonstancoj, sed ni povas esperi, ke specimena teksto donos al vi almenaŭ inspiron por provo propra.

SIA nun aperas en Chase's Calendar of Events.

REKLAMTARIFOJ

Niaj membroj memoru, ke ELNA Newsletter estas la plej efika rimedo por trafi usonajn esperantistojn! Nia reklamtarifo estas treege modesta: nur \$15 por duona paĝo, \$12 por triona, \$10 por kvarona kaj \$7 por okona. Rabato por almenaŭ trifoja aperigo, 15%. La redakcio kompreneble rezervas al si la rajton rifuzi aŭ lingve revizii laŭ sia bontrovo.

ABONSERVO

Abonojn al ĉiuj esperantaj periodaĵoj de la mondo peras Esperanta Lingva Serva Kompanio, 3318 N. Lake Shore Drive, #801, Chicago, IL 60657. Sendu afrankitan koverton por prezlisto de 76 gazetoj el 28 landoj.

KAMIZOLOJ "NE KROKODILU"



Por sciigi pri prezoj, grandecoj, koloroj ktp. de kamizoloj (angle: T-shirts) kun la devizo "Ne krokodilu!" sub la ĉi-supra desegnaĵo, skribu al la Esperanto-Klubo de Dentono, P. O. Box 9792, NTSU, Denton, TX 76203.

Ni bezonas vin!

La redakcio ankoraŭ ne trovas sin superŝutata de fotoj. Kvankam kelkaj pli-malpli regule donas sian helpon—ni danke menciu Johanon Fulton, Ellie Stein, Dori Vallon kaj Doroteon Holland—tre mankas fotoj de eksterkalifornia agado. Pro tio, iuj personoj, ekz. via redaktoro, jam kelkajn fojojn aperis en la organo ĉi-jare, sed pri la aspekto de tiel multaj aliaj samideanoj ni eĉ ne havas supozon.

Kaj ne nur fotojn, sed ankaŭ ĉiuspecajn novaĵojn ni petegas! Antaŭdankon!

KLARIGO

Kelkaj niaj legantoj eble legis pri 25-mildolara kontribuo al Esperanto fare de mond-fama tenisisto Bobby Riggs. Ni volas klarigi, ke tiun sumon li donis ne al ELNA sed al LOVE (Language Organization Voicing Esperanto), tute sendependa grupo, kiu bazigas en Montrealo, Kanado. LOVE ĉefe okupigas pri utiligo de la internacia lingvo ĉe la Montrealaj Olimpikoj en 1976, kaj ELNA esperas havi kun ĝi amikajn kaj kunlaboremajn rilatojn lige al tiu kaj aliaj projektoj.

Propono pri nomŝanĝo

En venonta numero de Kontakto aperos artikolo pri "unu el la plej gravaj infektaj mensaj malsanoj de la nuntempo (kiu) nomiĝas usonito. Inter la simptomoj plej karakterizaj troviĝas markita manio por Coca-Cola, maĉgumo, sovaĝokcidenta pantalono...." Kvankam via redaktoro kiel sennaciisto havas iom malsaman opinion pri la "malsano," ni trovas citinda alian opinion, kiun la verkinto substrekis en la al ni sendita kopio: "Karakteriza ekzemplo pri usona superrego estas la nomo de la landa asocio en Usono, nome "Esperanto-Ligo por Norda Ameriko.... Kanadaj esperantistoj protestu!"

Ankaŭ unu partopreninto de nia Kongreso en Spokane protestis, ke "se vere ekzistas alia esperanta organizaĵo por Kanado (kaj eventuale por aliaj nord-amerikaj landoj), kial nia organizaĵo nomiĝas Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko? Tia eble senkonscia ago estas preskaŭ tiel imperialisma, kiel nia ideo pri la anglalingva regado...."

Fakte, ne nur Kanado havas plendmotivon, ĉar ankaŭ Meksikio, malgraŭ misa geografio de PIV, apartenas al Nord-Ameriko. Tamen, ni sub ordinaraĵoj cirkonstancoj ne multĉe atentus la ĉi-suprajn plendojn, ĉar la ĝenoj ĉe eventuala nomŝanĝo preskaŭ certe superpezus la avantaĝojn. (Estas ankaŭ rimarkinde, ke la supozeble ofenditaj nacioj ne plendas, sed fosas la propran sulkon sen perdi energion per protestado.) Sed en la momento, la situacio estas pli ol ordinare favora al nomŝanĝo.

La afero estas, ke ELNA jam de kelka tempo ne estas korporacio, sed ke oni konsideras la dezirindecon restarigi tiun statuson. Kompreneble, estus plej facile ŝanĝi la nomon dum nia provizora nekorporacieco. Ni tial malfermas la organon al debato pri la temo.

Jen du proponoj por nova nomo: Esperanto-Ligo por Usono (ELUS; angle, Esperanto League for the United States) kaj Esperanto-Asocio de Usono (EAU; angle, Esperanto Association of the United States).

- 1) Ĉu la nomo estas ŝanĝinda?
- 2) Se ni ŝanĝus la nomon, kiun novan formon vi preferus?

Se la redakcio ne ricevos almenaŭ dudek jesajn respondojn al la unua demando, ĝi forlasos pluan diskutadon pri ĉi tiu temo.

Novaj UEA-Kotizoj

Ni bedaŭras informi ke, por la dua sinsekva jaro, UEA devas draste altigi la kotizojn. Jen la tarifoj por 1975: Membro kun Jarlibro, \$9,50; Membro-Abonanto, \$19,00; Membro-Abonanto kun Kontakto, \$19,00; Membro-Subtenanto, \$57,00; Juna Membro kun Jarlibro, \$4,75; Juna Membro-Abonanto, \$14,25; Abono al

Esperanto, \$14,25; Abono al Kontakto, \$5,00; Patrono "A" de TEJO, \$10,00. La membraro baldaŭ ricevos UEA-aligilojn de nia Ĉefdelegito, s-ro Armin F. Doneis, P. O. Box 105, Pharr, TX 78577.

ANONCETOJ

La Centra Oficejo petas, ke iu afabla samideano, kiu intencas veni al norda Kalifornio tra Tucson, Arizono, sin proponu al ni por helpi al la ELNA-Arkivo en Monterey per Transportado de diversaj valoraj esperantaĵoj.

16-jara lernanto de aŭtomobila riparado volas korespondi kun samaĝa lernantino. László Kovács, 6000. Kecskemét, Aprilis 4 t. 2. szám., Hungario.

La Mondcivitana Respubliko bezonas kunlaborantojn por skribi, de temp' al tempo, leterojn en la jenaj lingvoj: franca, hispana, nederlanda, dana, norvega, sveda, hebrea, vjetnama kaj, precipe, esperanta. Necesos nek vastaj scioj nek tro da laboro. Oni sin proponu al Mondcivitan Republic Regional Center, 204 N. Normal, Macomb, IL 61455.

15-jara studento Roberto Chan, Mantas 122, Lima A, Peruo, volas interkonatiĝi per plume kun samaĝa usonano.

Fieremuloj pri sia inteligento nepre kontaktu Espermenson, kiu akceptas membrojn nur el la du inteligentece plej superaj procentoj de la monda logantaro. Skribu al Harry J. Lewis, Sekretario, Espermenso, Box 1322 North P. O., Halifax, N. S., Kanado B3K 5H4.

Agronomika inĝeniero 28-jara volas korespondi. Inĝ. Marino Portal Gonzáles, Apartado #4, Ceiba del agua, Habana, Kubo.

Ĉu vi volas efike reklami vian Esperanto-kurson? Belan kursafison oni povas ricevi po 2¢ de s-ro W. H. du Temple, 930 Ardmore Drive, R. R. #2, Sidney, B. C., Kanado V8L 3S1.

Interŝanĝi esperantaĵojn volas 26-jara havena oficisto. (S-ro) Takahashi-Yoshiteru, 6-15, Sokashita-cho, Isogo-ku, Yokohama 235, Japanio.

Konfidencan pritrakton ricevas ĉiu informpeto pri Internacia Samsekema Esperantistaro, P. O. Box 3042, Burbank, CA 91504.

46-jara edzo, kiu nenion kolektas, tre volus korespondi pri ĉiutagaj vivaferoj. Marian Jeżyk, Skrytka 299, 44-101 Gliwice, Pollando.

Du 14-jaraj lernantinoj volas korespondi kun gesamaĝuloj: Erika Kejár, Fürst S. út. 77, kaj Klára Kovács, Korvin O. út. 8, ambaŭ ĉe 7629 Pécs, Hungario.

(daŭrigo sur p. E-7)

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

P. O. Box 663, Houston, Texas 77001
 504 North Fifth Street, Gallup, New Mexico 87301

INFORMOJ
 por
 SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO
 (lasta plena semajno en februaro)



AL: Ĉiuj membroj de ELNA:

A. Bonvolu memori la daton: de la 16a ĝis la 22a de februaro 1975.

B. Reklamiloj haveblaj:

- | | | |
|---|-----------|---|
| 1. Afiŝoj | po 2¢ | <i>(Bonvole notu: Minimuma mendo por kartoj aŭ afiŝoj estas \$1.00 usona)</i> |
| 2. Salutkartoj, kiel en la pasinta jaro, aŭ kun aŭ sen la insigno | 3 por 10¢ | |
| Salutkartoj kun la SIA-saluto en diversaj lingvoj ĉirkaŭ la rando | 3 por 10¢ | |

C. Sugestoj por proklamado:

- | | |
|--|--|
| 1. Ĵurnaloj | <i>(Ni helpos al vi komponi artikolojn, anoncojn, reklamojn, proklamojn, leterojn, laŭ via peto)</i> |
| 2. Radio, televido | |
| 3. Reklamoj | |
| 4. Proklamoj de urbestroj, ŝtatestroj | |
| 5. Leteroj al individuoj kaj organizaĵoj | |

D. Sugestoj por solenaĵoj dum la SIA:

1. Publika kunveno
2. Seminario pri lingvo-unuco
3. Ekspozicioj en butikaj fenestroj
4. Pikniko
5. Prelegantaro konsistanta el diverslingvanoj
6. SIA-matenmanĝo
7. Ekspozicio ĉe publika biblioteko

E. Se oni faras fotografaĵojn, bonvolu inkluzivi, se eble, diverslingvanojn.

F. Raportoj:

1. Sur la dorsa flanko troviĝas raporto por plenumi kaj sendi al unu el la du supraj adresoj.
2. La raporto atingu nin plej malfrue la 8an de marto 1975.

(Bonvolu turni)

P. O. Box 663, Houston, Texas 77001
504 North Fifth Street, Gallup, New Mexico 87301

DE:

(Nomo de societo, grupo, individuo aŭ klubo)

(Adreso)

Ĉi tiu raporto estu sendita al unu el la supraj adresoj antaŭ la 8a de marto 1975.

A. *Ĵurnalaj artikoloj*

1. Kiom da koloroj: _____
2. Kiom da ĵurnaloj: _____
3. Ĉu vi reklamis? Jes _____ Ne _____

B. *Radio*

1. Kiom da anoncetoj: _____
 2. Kiom da tempo por ĉiuj programoj: _____
 3. Intervjuoj (donu nomojn de personoj kaj voksignalojn de stacioj):
- _____
- _____

C. *Televideo*

1. Kiom da anoncetoj: _____
 2. Kiom da tempo por ĉiuj programoj: _____
 3. Intervjuoj (donu nomojn de personoj kaj voksignalojn de stacioj):
- _____
- _____

D. *Aliaj proklamadoj*

1. Ekspozicioj (nomu la butikajn fenestrojn, bibliotekojn k. t. p.):
- _____

2. Priskribu aliajn:
- _____
- _____

E. Kiamaniere vi solenis la SIA-n? Bonvolu nombri la ĉeestantaron.

F. Ĉu estis proklamo de urbestro aŭ ŝtatestro? Se jes, bonvolu almeti trakopion.

G. Ĉu vi disdonis aŭ dissendis broŝurojn? Se jes, kiom, kaj kio estis la reago?

H. Ĉu vi havas sugestojn por la Semajno de Internacia Amikeco 1976?

I. Bonvolu almeti fotojn kun titoloj, trakopiojn de proklamadoj, ekzemplerojn de programoj, elĉerpaĵojn el ĵurnaloj (aldonu nomon de ĵurnalo kaj daton).
(Aldonu folion se vi trovas tion necesa.)

BOOKLIST APPENDIX

Detach this list and ADD to CURRENT BOOKLIST

ELNA's booklist of several hundred titles, Price \$1.00, is free to members.

TEACHERS: Please order texts at least three weeks in advance of need.
Do not ask students to order their own. This will reduce the already heavy workload of the Central Office. Thank you!

NO. 2

SYMBOLS * indicates relatively easy readers - See also our Juvenile Book List pp. 38,39
[] indicates translator and the language from which translated where known

Some old titles are in short supply; no longer available when present stock gone.

Page	Price changes and corrections	Page	
6	Konversacia Literaturo \$1.75	26	Somera Simfonio 1.75
8	Dangera Lingvo 2.75	35	NI KANTU EN ESPERANTO
10	Delete Matematikaj Metodoj en Lingvistiko - Maas		is now in stereo
16	Nega Lando 6.25	36	False Friends .15
18	Delete Sonorilo de Bled	37	HEROLDO DE ESPERANTO 11.00
19	Sercoj-Rakontoj .75	23	Esperanta Angologio, delete "paper" 6.95
21	Ni Komeditas 1.00	33	Kentiki 6.95
25	Mondo kaj Koro .95	39	Ora Fiŝo 1.25

Popular Learning Aids

Study Kit

How to Understand and Speak Esperanto - Paul Fox 70.00
Includes Workbook; Esperanto/English/Esperanto Dictionary (Wells);
6 cassettes - 12 lessons - good pronunciation

Additional Workbooks (ask about quantity discount on workbooks) - - - - each 2.50

Esperanto Language and History

Works of L. L. Zamenhof - new edition from Japan with fascinating appendices of historical commentary; hardbound:

Vol. 1 Unuaj Libroj por Esperantistoj. First three brochures published on the international language (Unua libro, Dua libro, Aldono al la dua libro) 160 p bound 7.50

Vol. 2 Ni laboru kaj esperu! tempoj ĝis kaj de "la esperantisto". Letters and articles, 1887-1891. Early struggles to keep movement alive. 350 p bound 8.00

Vol. 3 Antaŭen al la laboro! tempo de "esperantisto". Letters and articles, 1892-1895. Includes only available text of 1894 reform project. Closes with Russian censor's interdict on first Esperanto periodical. 352 p bound 8.00

SPECIAL DISCOUNT for ELNA MEMBERS: Set of 3 volumes \$22.00

////////// ESPERANTO LITERARY TREASURE //////////

A complete collection of Literatura Mondo (1922-26, 1931-38, 1947-49)

3,148 pages, large format, illustrated; six deluxe bound volumes.

A showcase for some of the top Esperanto authors.

Of the 400 sets printed, 300 have been sold.

Six volumes complete 125.00

Vol. 1 available now; Vol. 6 due Summer 1975.

Includes shipping and insurance

//////////

Prose

*La AKROBATO DE NIA SINJORINO - an ancient legend [Edward S. Payson] 19 p paper .75

AMORO KAJ PSIĤE - Lucius Apuleius [Emilo Pffeffer, Latin] 53 p paper .75

*BLANCHE, La Virgulino de Lille - [Edward S. Payson] 33 p paper .75

BULGARAJ RAKONTOJ - Ivan M. Vazov [at. D. Atanasov, Bulgarian] 52 p paper .75

DON KLĤOTO - Cervantes [F. Pujol, Spanish] - 5 chapters 55 p paper .75

ELEKTITAJ NOVELOJ - I. S. Turgenev [Alexandra Mexin, Russian] 81 p paper 1.75

HEBREAJ RAKONTOJ - Šalom Alehem [Is. Mucnic] 78 p paper 1.25

La HISPANA TRAGEDIO - Jef. Last [G. J. Degenkamp, Dutch] 187 p bound 3.50

Accounts of the Spanish Civil War

HUNGARAJ RAKONTOJ - Ferenc Herczeg [A. Panajott, Hungarian] 48 p paper .75

JAPANAJ RAKONTOJ - [Chif Toshio, Japanese] 70 p paper .75

La KAPAO - Akutagawa [Nozima, Japanese] 93 p paper 1.50

4 tales about the Kapao a sort of Japanese leprechaun, an amphibious creature before whom children must bow or else water will spill from his head and they will die. A sure method for teaching the art of bowing low.

La KAPITANFILINO - A. S. Pushkin [M. Sidlovskaja, Russian] 172 p paper 2.50

LANDO DE ARGENTĀ AKVO - Vingie E. Roe [Edward S. Payson, English] 48 p paper .50


La LASTA USONANO - J. A. Mitchell [Lehman Wendell, English] 48 p paper .75

MARIA KAJ LA GRUPO - Emba - a tale about Esperanto club activity 172 p paper 1.75

E-6 (Prose continued)

<u>MIA POŜHORLOGO/La FUMO</u> - M. Konopnicka [Kabe, Jerzy Grum, Polish] Both translators, Kabe in the classical, Grum, modern, have fine style (notes for the Polish beginner)	45 p paper	.95
<u>La NEKONATA KONATO</u> - Douglas P. Boatman - original mystery	120 p bound	2.50
<u>NOVELOJ DE LUSIN</u> - (Peking) - deluxe volume, handsomely illustrated	488 p bound	3.95
<u>PAŬLO KAJ STEFANO</u> - Francisco candido Xavier - historical novel	544 p paper	5.95
<u>POR RECENZO!</u> - K.R.C. Sturmer	61 p bound	1.25
<u>RUSAJ RAKONTOJ</u> - Mamin Sibirjak [N. Kabanov, Russian]	47 p paper	.75
<u>SE GRENERETO</u> - Kenelm Robinson	159 p bound	2.50
<u>La SONGO DE MAKARO</u> - V. Korolenko [M. Sidlovskaja, Russian]	48 p paper	.95
<u>SORĈISTINO EL KASTILIO</u> - Salom Asch [I. Lejzerovicz, Hebrew]	147 p paper	2.50
<u>STRANGA HEREDAJO</u> - H. A. Luyken	320 p bound	3.50
<u>TRI HOMOJ EN BOATO</u> - Jerome K. Jerome [G. Badash, English]	256 p paper	2.75
<u>Mixed Literature</u>		
<u>SVISA ANTOLOGIO</u> - Edited by Arthur Baur [from the 4 official languages of Switzerland: French, German, Italian, Romanche]	540 p paper	6.95
<u>UNIVERSALA LEGOLIBRO</u> - Wilhelm Fricke - 90 readings, original and translated from world literature	176 p paper	1.95
<u>UNUA LEGOLIBRO</u> - Kabe - collection of short readings, some translated	160 p paper	1.75
<u>Drama</u>		
<u>NATAN LA SAĜULO</u> - Gotth. Ephr. Lessing [Karl Minor, German]	208 p paper	1.50
<u>Poetry</u>		
<u>MIA SPEKTRO</u> - N. Kurzens (1931-1935)	64 p paper	.75
<u>La VAGABONDO KANTAS</u> - Julio Baghy	112 p paper	1.50
<u>Biography</u>		
<u>VETERANO</u> - Ismael Gomes Braga (2nd ed) Brazil's famous Esperantist	231 p bound	3.95
<u>History</u>		
<u>CERTE TRIUMFOS LA POPOLO DE VJETNAMIO</u> - large format photos	97 p paper	.95
<u>HISPANA TRAGEDIO</u> (see prose, page 1)		
<u>La JUDA STATO</u> - Dr. Theodor Herzl [Bernard Selzer, German] 1934 an attempt at solution of the Jewish problem; portrait and biography of the author	141 p paper	2.00
<u>Geography and Travel</u>		
<u>GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO</u> - bildoj kaj faktoj (1969) maps, illus.	256 p paper	2.00
<u>Science</u>		
<u>Botany</u>		
<u>ARBOJ DE LA ARBARO KAJ KAMPO</u> - Frank Booth; Illustrator, Edith Turlington	38 p paper	.65
<u>Electrical Technology</u>		
<u>INTERNACIA ELEKTROTEKNIKA VORTARO</u> Esperanto/Polish/English/French/German/Italian/Swedish (mimeographed)	174 p paper	3.50
<u>Medicine</u>		
<u>NIA KORPO</u> - Seiho Nishi, M. D., Gunma University (1964) Human anatomy and physiology for laymen	108 p paper	2.95
<u>Music</u>		
<u>MUZIKNOTOJ</u> - Songs: <u>Maude</u> , Tennyson [Kalocsay]; <u>Kisoj</u> , <u>Melodioj al la Maja Idilio</u> , Kalocsay; <u>Siberia Lulkanto</u> , <u>Barkarolo</u> , <u>Nova Sento</u> , <u>Kantantaĵ Postenoj</u> , <u>Fabelo</u> , <u>Vane</u> , <u>Koron Tuŝis</u> , Baghy. Music by Kalocsay, Sarossy, Ammer, Pallos, Gurilev.	34 p paper	1.95
<u>Periodicals</u>		
<u>HEROLDO</u> - Double Congress Issue - 75¢ including mailing (see Price Changes, page 1 herewith)		
<u>JUNA AMIKO</u> - magazine for teenagers	3 times yearly	1.50
<u>Miscellaneous</u>		
<u>Friendship Cards</u> - original designs by Erik Felker Poetry by Hilda Dresen; Esperanto and Spanish verse of Amado Nervo (specify poet) each (folder format without envelope - pastel colors)		.25

Gummed stickers for the NEW YEAR—good way to subtly advertise Esperanto to your friends. 18 for 25¢; if ordered separately please add 10¢ for postage.



Kuiristo-kelnero, 23-jara, deziras interŝanĝi poŝmarkojn kaj esperantajojn. Vláda Hasala, CS-696 11 Mutěnice 687, Ĉeĥoslovakio.

16-jara knabino volas interŝanĝi bildkartojn. Mária Gácsi, Soltvadkert, Vak-Bottyán u. 21, Hungario.

Ĉe la Bahaanoj

(Sekvas raporto de Roan Orloff Stone pri la ekspozicio de Bahaa Esperanto-Ligo ĉe la Usona Bahaa Konferenco, Saint Louis, Misurio, 1974. 08.30/09.01.)

La Bahaa Esperanto-Ligo ricevis inviton de la Usona Nacia Spirita Asembleo partopreni la unuan ĉiujaran konferencon pri la nova Kvin-Jara Plano. Komprenoble, ni akceptis.

La ekspozicio okazis en la hotelo Jefferson. Estis sepdek diversaj budoj. La budo de BEL estis en la plej strategia loko, tute apud la Bahaa Libro vendejo. Ĉiuj, kiuj volis aĉeti Bahaajn librojn, devis preterpasi la BEL-budon.

Ĉeestis la Konferencon 10 000 Bahaanoj, el kiuj 2 000 estis infanoj, kiuj havis siajn proprajn klasojn. Ĉiuj plenkreskuloj vidis nian budon. Venis multaj komplimentoj pri ĝia aranĝo. Ni opinias, ke tri ĝis kvar mil venis en nian budon por peti informojn pri Esperanto kaj pri BEL.

Ĉeestis BEL-anoj Georgia kaj John Dale, Julie Regal, Roan Orloff Stone, Clyde Corson, Stuart Kittredge, Diane kaj Paul Friedman, kaj Nick Athan kaj lia patrino Sylvia Athan.

Georgia kaj John Dale kaj Roan Orloff Stone multe interkonsiliĝis, kaj poŝte kaj telefone, por aranĝi la budon. Ili preskaŭ senĉese deĵoris dum la tuta konferenco, kiel ankaŭ Stuart Kittredge, kiu ĵus revenis de la UK en Hamburg. Al la Esperanto-Societo de Chicago ni esprimas elkoran dankon pro pruntedono de literaturo por la ekspozicio.

Estis nia unua granda entrepreno, kaj ni lernis multe. Estonte, ni havos pri da libroj por montri, sonbendon aŭ diskon en Esperanto, kaj, se eble, apartan lokon por mallongaj klasoj.

KOREKTOJ

Ni pardonpetas pri jenaj tajperaroj en la lasta numero: El la artikolo "Nian tutkoran dankon" elfalis la oka linio, tiel ke "konferanseo Ken Thomson kaj mondfama mimikisto Duncan Charters" iĝis "konferan-Charters" (p. 2). Ĉe la kongresa rezolucio (p. D), dua linio, "in" estu "are"; naŭa linio, "UN-USA" estu "UNA-USA". Sampaĝe, ĉe la lasta linio de la fotopriskribo, "(back)" estu "(front)".

Ĉina monata gazeto en Esperanto

EL POPOLA ĈINIO

varbas abonantojn de 1975

Abonprezoj: 1-jara £ 0.90 US \$2.20
2-jara £ 1.35 US \$3.30
3-jara £ 1.80 US \$4.40

Abonu ĉe la loka peranto:

Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko
P. O. Box 508
Burlingame, CA 94010

aŭ rekte ĉe la Esperanta Sekcio de

GUOZI SHUDIAN
(Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)
P. O. Kesto 313
Pekino, Ĉinio

Bonvole abonigu ankaŭ viajn amikojn

Senpagaj specimenoj akireblaj laŭ peto

RECENZO

iam kompletigota verkaro de l. l. zamenhof. eldonejo ludovikito. Bind. Unua eldonnombro, 999 ekz.

kajero 1: unuaj libroj por esperantistoj. Kameoka, 1973. 160p. \$7,50.

kajero 2: ni laboru kaj esperu! tempoj ĝis kaj de "la esperantisto". Kioto, 1974. 350p. \$8,00.

kajero 3: antaŭen al la laboro! tempo de "esperantisto". Kioto, 1974. 352p. \$8,00.

El la mistera Oriento venas ĉi daŭrigota volumaro, eldonata de la misteraj "unuel de ludovikito", "emilia k. m. ĝojkampf" kaj "markido mado". Ĝi konsistas ĝis nun plejparte el la enhavo de Originala Verkaro, tamen kun korekto de tieaj eraroj, pli pure kronologia (anstataŭ laŭkategoria) aranĝo, kaj kelkaj pliaj tekstoj.

Plej grandan intereson al la zamenhofologo prezentas, komprenoble, tiuj pliaj tekstoj. Ili inkluzivas la specimenojn de la nova lingvo, kiuj aperis en la unuaj broŝuroj: "Patronia", "El la Biblio" kaj "Letero" el Internacia lingvo (vulgare misnomata Unua libro); la unua, nefundamenta, ekzercaro, kaj la andersena "mirrakonto" "La ombro" el la Dua libro. Ĉio-ĉi havas grandan filologian intereson.

La plejfruaĵoj aspektas nun iom mallertaj, ĉar de post la epoko de ilia apero multe konstantiĝis kelkaj tiam neklaraj gramatikaĵoj, ekz. la uzo de la refleksivo kaj de la adverbo.

La interlingviston interesos la reformprojekto de 1894, kiun Dietterle en OV rifuzis enpreni pro iom pridubinda motivo, t. e. ke Zamenhof iam petis al BEA leĝe persekuti en lia nomo okaze de senpermesa represo de la artikolserio. Utila estus funda komparo inter la reformprojekto kaj poste aperintaj planlingvoj. La projekton inspiris la sama bakterio, kiu poste generis Idon, Occidental, Interlingua-n ktp.: la naturalismo. Ĝi nepre meritas studon, ĝuste kiel ĝia forĵetado far la pioniroj meritas nian plej profundan dankon.

Ĉiun volumon (kial oni nomu fortike tolbinditan, pli-ol-300-paĝan libron "kajero"?) finas tre ampleksa "felietona historieto", kies neuzo de majuskloj tuj diferencigas ĝin disde la zamenhofaj tekstoj. Tie oni trovas kelkajn leterojn kaj artikolojn de pioniroj, rilatajn al la tiuvolumaj verkoj de Zamenhof; kurantan enhavtabelon de (La) Esperantisto, la unua periodaĵo en la lingvo internacia; bibliografion kun komentoj pri la dume aperantaj verkoj en kaj pri Esperanto; kaj la legerajn sed legindajn komentojn de la kompilinto. Ankaŭ aperas detala indekso.

La unua volumo enhavas ne tre kredindan historion de la nuna eldonentrepreno. Kvankam "ludovikito" belstile asertas sian nekapablon uzi la amatan lingvon, rondiras oniflustron, ke tiu nomo kaŝas unu el niaj plej fluparolaj samideanoj.

La tria volumo fermiĝas ĉe la jaro 1895, kiam la rusa cenzura malpermeso al La Esperantisto preskaŭ mortbatis la junan lingvon.

Ne estas klare, ĉu estontaj volumoj prezentos la nun nealireblajn tradukojn far la Majstro; ni nepre esperu, ke jes.

Ni funebras

multjare fidelan ELNA-pioniron Antonio Nabby, kiu mortis en la finaj tagoj de aŭgusto en Milwaukee, Viskonsino, havante 88 jarojn. ELNA perdis fervoran, lojalan kunlaboranton.

Zigzage tra Esperantujo

Karl Nell, Donald Jones kaj Robert Dwelley aperis ĉe la eduka televidstacio, kanelo 21, en Rochester, Nov-Jorkio, dum duonhora programo je la 7a pm., lunde, la 30an de septembro. Juna studentino kantis la kanzonon "Jen nia mondo" komence de la programo.

Same sukcesan dissendon okazigis Briĉjo Burg ĉe stacio KOCE-TV en la graflando Orange (Kalifornio). Lin intervjuis f-ino Gail da Corsi.

D-ro Kimura Eiĵi, Ĉefo de la Virus-Esplora Fakto en la Instituto de Publika Higieno en Kobe, Japanio, mallonge vizitis Vaŝingtonon (Kolumbio), montrante al tieaj esperantistoj la revuon de la Esperanto-Klubo de Kobe, kie aperadas liaj artikoloj pri virusstrukturoj.

Dufoje monate okazas kant-vesperoj ĉe la Esperanto-Societo de Vaŝingtono. Sekretario Sergio Docal sendube provizas multajn el la kantradukoj.

Marilyn Kadish intervjuiĝis en ampleksa artikolo en Lakewood Sentinel (Koloradio), 1974.08.24, pri la UK en Hamburgo.

En la ĉi-jara kajero de Sennacieca Revuo aperas traduko de "La Dua Humanista Manifesto" de Mark Starr. Nia nelacigeblulo represigis sian tradukon kaj dissendigis al la membraro de la Humanista Societo. Li rimarkas en la enkonduka noto, ke li subskribis ambaŭ manifestojn, la nunan kaj la unuan, kiun prezentis John Dewey en 1933.

Pri la Esperanto-kursaro ĉe San-Franciska Ŝtata Universitato prelegis Marianne Lee ĉe la septembra kunveno de Esperanto-Klubo de Los Angeles. Ŝin helpis pluraj aliaj klubanoj, kiuj partoprenis la kursaron.

Al la societo Toastmasters ĉe la Social-asekura Administracio en Baltimore prelegis Thomas H. Goodman, 1974.08.31, pri sia vojaĝo tra eŭropa Esperantujo, provante difini tiun neniean-ĉiean landon al sia aŭskultantaro.

Al ĉirkaŭ okdek lingvolernantoj prelegis Roan Orloff Stone en Fort Lewis, Nov-Meksikio, la 2an de oktobro. Ŝiajn fortojn evidente ne elĉerpis la agado ĉe la bahaa konferenco en Saint Louis, Misurio, pri kiu ni raportas aliloke.

35 anoj de la klubo Kiwanis aŭskultis prelegon de Cathy Schulze en Palo Alto, Kalifornio, la 3an de julio.


Rezulte de artikolo aperinta en New York Times, 1974.08.04, sufiĉe da interesitoj kontaktis la Esperanto-Societon de Nov-Jorko por pravigi publikan informvesperon, la 20an de septembro.

Martha Walker intervjuiĝis pri la internacia lingvo ĉe radiostacio KVOG, 1974.09.19.

La san-franciska societo SFERO ĝuis en septembro raportojn pri la Hamburga UK kaj aliaj someraj Esperanto-aktivecoj de pluraj siaj anoj. Ĉefprogramero en oktobro estis "Miljara historio de Hungarujo" de Francisko Mozsi, kiu ĵus venis al Usono el Belgujo.

Peruan "Karapulkan Feston" faris la Esperanto-Societo de Vaŝingtono honore al sia nova ano, d-ro Franklin Montenegro, la 15an de septembro.

Prelegis Donna Slusher de la Esperanto-Societo de Portland pri la historio de oregonia urbo Aurora ekde ĝia fondiĝo kiel religia komunumo ĝis la nuntempo, ĉe la oktobra kunveno de ESPO.



Among Dr. Wood's interests (see story below) is the monitoring of short-wave Esperanto broadcasts from Europe and Asia.

Esperanto Reviews in *Books Abroad*

Dr. Richard E. Wood, 34, Chairman of the Department of Languages and International Studies at Adelphi University (New York), has accepted the invitation of the prestigious academic journal *Books Abroad* to become its reviewer for Esperanto literature.

Books Abroad prints reviews of books appearing in several dozen languages, published all over the world. It is probably the best available tool for the U. S. foreign-language scholar to keep up with the current literary developments in his field.

Wood is among this country's leading authorities on pidgin and creole languages, particularly Papiamentu, literary language of the Netherlands Antilles. He has lectured on the subject at both the International Summer University (a feature of the annual World Esperanto Congress) and the Summer University Courses given in Esperanto at the University of Liège. He has offered to review Papiamentu as well as Esperanto works for *Books Abroad*.

A native of Scotland, Wood is best known in the Esperanto community as recently appointed editor of *La Monda Lingvo-Problemo*, a multilingual research journal with summaries in Esperanto.

Our Financial Crisis

is not over yet! A report will appear in our next issue. Why not help with an early Yuletide present for ELNA?

Courses! Courses! Courses!

Please note that the following makes no pretense of completeness. It notes only a few of the Esperanto courses so far reported to the editor. We request that all Esperanto

instructors send interesting details about their courses to the Central Office from time to time, but not to forget that a report should be made also to William P. Simpson, Education Secretary, American Association of Teachers of Esperanto, 2115 Walnut Street, Harrisburg, PA 17103. Last year AATE reported 62 courses with 833 students; conscientious reporting could surely mean better statistics this year!

ALASKA: Both beginning and intermediate courses are available in Juneau, under the supervision of geologist and radio ham Walter L. Gnagy. The instructor for the beginners speaks French, Italian, Spanish, Portuguese, and Japanese, as well as English and Esperanto, and has taught foreign languages in South America and Japan. The advanced students will be taught by the holder of a degree in Russian. Who says Esperanto isn't for polyglots?

CALIFORNIA: Bill Schwartz continues with an informal class in San Diego. Martha Walker, who recently graced the pages of *La Brita Esperantisto* with a delightful short story, is teaching at Napa College. In Vista, retired teacher Kay Loftus gives a course. La Honda Elementary School enjoys two classes taught by Mary Catherine Sears. Ms. Sears joined ELNA Secretary Bob Bailey to give an intensive weekend course at the Menlo Park Civic Center in the middle of October. Doris Vallon, who teaches Esperanto at Abbott Middle School in San Mateo, will give a demonstration on the international language at the annual meeting of the Foreign Language Association of Northern California in November. ELNA Archivist Dr. B. J. Balcar abandons his files and bookshelves long enough to instruct every week at Pacific Grove Adult School. Bill and Cathy Schulze, at last liberated from the Esperanto Book Service by the Central Office of ELNA, will be able to devote more time to the beginning and intermediate evening courses they teach at Galileo Community College in San Francisco.

COLORADO: Librarian Marilyn Kadish, who just founded an Esperantist women's liberation group, Ŝiberiĝo Internacia, at the World Congress in Hamburg, teaches two classes in Denver.

FLORIDA: The indefatigable Gizella Giguere gives special Esperanto courses for gifted children under the Department of Exceptional Child Education for Hillsborough County. She has a total of nine classes with 122 children. North Miami Beach is now following her lead, with a class for

the gifted at Highland Oaks Elementary School as part of the Communications course taught by Sheila Firestone.

HAWAII: For several years Esperanto has been studied as part of a sixth-grade program in Communications in the statewide Hawaii English Program, using materials developed by Mary Catherine Sears (see California).

ILLINOIS: R. Kent Jones has two courses, one for employees of the Metropolitan Sanitary District of Greater Chicago, where he is assisted by John Dale, and a second at the Chicago YMCA. Dr. Charles Oaklief of Harper College in Palatine now offers an official course there. Valrie Hackett, who has already demonstrated an increase in language aptitude on the part of Esperanto students, continues her class in Rolling Meadows, at Sacred Heart of Mary High School.

MASSACHUSETTS: The course at Hoosac Valley High School under Allan C. Boschen continues, with field trips ranging from mountain climbing to a visit to the UN.

NEW YORK: Mark Starr, who informs us that life begins at 80, does not intend to let his recently acquired octogenarianhood interfere with the class he gives at Bryant Adult Center in Long Island City. In New York City it is expected that a recent public meeting of the local Esperanto Society will result in one or several classes.

NORTH CAROLINA: Eugene H. Thompson, Jr., Assistant Professor of French at Guilford College in Greensboro, has arranged for his Esperanto course to satisfy Guilford's foreign language requirement.

OHIO: Sheri Scott is utilizing a grant for experimentation to implement a course at Wilmington College. At Circleville High School, Winnifred Brengle teaches Esperanto

to her advanced Latin class, which won first prize for Most Outstanding and Original Foreign Language Performance at the Otterbein College Foreign Language Festival this summer with an Esperanto playlet.

OREGON: Activities continue to rotate around Portland, where the 1972 World Esperanto Congress took place. The Oregon Association of Teachers of Esperanto promoted Education Day (October 11), which had the keynote address "Esperanto and the Cross-Cultural Approach to Education", given by Dorothy Hackbarth, President of the UNESCO Association of the United States. Betty Walther, Lura Chapman and Jim Deer give weekly classes at the Portland Public Library. Hazel Heusser, who has been called the most experienced Esperanto teacher in the country, teaches the language as part of her social studies class at Portland's Laurelhurst Elementary School.

PENNSYLVANIA: AATE Education Secretary William P. Simpson (see above) contributes to his own statistics by teaching a course at Elizabethtown College. Joseph Conroy's Esperanto class is part of the federally funded Magnet Foreign Language Program of the Philadelphia School District.

TEXAS: The Esperanto Club of Denton regularly offers classes under the able leadership of Earl Bills, who has recently been investigating the possibilities of producing new and better audio-visual materials for the international language. John Victory teaches Esperanto at the Kincaid School in Houston. Ken Thomson teaches a class at Houston's Free University.

WASHINGTON: Elizabeth O'Brien Stafford is instructor of a class at the University of Washington Experimental College in Seattle. Albert and Sara Ann Estling give classes in Walla Walla, where there is also a special children's class under Joy Laughlin.

ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA
P. O. Box 508
Burlingame, CA 94010
Usono/USA



Nonprofit Organization U.S. POSTAGE PAID Burlingame, CA Permit No. 296



NEWS PLEASE EXPEDITE

Address Correction Requested
Return Postage Guaranteed